Franz Freiherr von Dingelstedt,

# An der Weser

Hier hab' ich so manches liebe Mal
Mit meiner Laute gesessen,
Hinunterblickend ins weite Tal
Mein selbst und der Welt vergessen.

Und um mich klang es so froh und so hehr
Und über mir tagt' es so helle,
Und unten brauste das ferne Wehr
Und der Weser blitzende Welle.

Wie liebender Sang aus geliebtem Mund,
So flüstert' es rings durch die Bäume.
Und aus des Tales offenem Grund
Begrüßten mich nickende Träume.

Und um mich klang es so froh und so hehr
Und über mir tagt' es so helle,
Und unten brauste das ferne Wehr
Und der Weser blitzende Welle.

. . .

Franz Freiherr von Dingelstedt,

# Ĉe la Weser

*tradukita de H. W. Funk*

Jam ofte sidadis mi tie ĉi
Kun mia liuto, kantante;
En valon profunden rigardis mi,
Pri mond', pri mi mem forgesante.

Kaj sonis muziko majeste en rond',
Kaj super mi lumis lazuro;
Malsupre arĝente brilegis la ond'
De l' Weser kun brua murmuro. —

Kaj kiel el buŝo de amatin'
Tra l'arboj sonetis kantajoj;
El fundo de l'valo salutis min
Plej belaj, plej ĉarmaj revaĵoj.

Kaj sonis muziko majeste en rond',
Kaj super mi lumis lazuro;
Malsupre arĝente brilegis la ond'
De l'Weser kun brua murmuro. —

. . .

Franz Freiherr von Dingelstedt,

# Ĉe la Vezero

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Kun mia liuto tie ĉi
Multfoje surmonte mi sidis,
Min mem kaj la mondon forgesis mi,
Dum tiun ĉi valon mi vidis.[4]

Kaj plena estis de hela bril'
Kaj gaja sonor' la aero,
Bruadis malsupre la akvobaril',
Briletis la ond' de l' Vezero.

Flustradis kvazaŭ defore tra l'
Arbaro de l' am melodioj,[5]
Kaj el la aperta grundo de l' val'
Salutis min sonĝaj vizioj.

Kaj plena estis da hela bril'
Kaj gaja sonor' la aero,
Bruadis malsupre la akvobaril',
Briletis la ond' de l' rivero.

. . .

[4] aŭ:
Kun mia liuto tie ĉi
Multfoje mi estas sidinta,
Envalen vidante estas mi
La mondon kaj min forgesinta.

[5] aŭ:Arbaro amkant-melodioj,

Da sitz' ich auf's neue und spähe umher
Und lausche herauf und hernieder,
Die holden Weisen rauschen nicht mehr,
Die Träume kehren nicht wieder.

Die süßen Bilder, wie weit, wie weit!
Wie schwer der Himmel, wie trübe!
Fahr wohl, fahr wohl, du selige Zeit!
Fahrt wohl, ihr Träume der Liebe!

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* Franz Freiherr von Dingelstedt *(∗1814-06.30 – †1881-05-15).*

*Arg-424-835 (2012-11-01 15:24:50)*

*Siehe:* http://ingeb.org/Lieder/hierhabi.html*. Tie estas aŭdebla ankaŭ la melodio. Siehe auch:* http://de.wikipedia.org/wiki/Franz_von_Dingelstedt *und* http://www.youtube.com/watch?v=uiM1Riti02A*. Siehe ebenfalls:* http://www.myheimat.de/luhden/kultu/freiherr-franz-von-dingelstedt-1814-1881-fuenfter-teil-d412319.html *und* http://www.goethezeitportal.de/index.php?id=4178*.*

Denove mi sidas nun tie ĉi,
Sopiron en koro mi tenas;
Aŭdiĝas ne plu la melodi',
La revoj neniam revenas.

La bildoj, la belaj, nun estas for, —
Ĉielo sen luma ornamo. . .
Adiaŭ, beltempo, iama trezor',
Adiaŭ, ho revoj de l'amo!

*Traduko de la Germana poemo "An der Weser" de* Franz Freiherr von Dingelstedt *(∗1814-06.30 – †1881-05-15) en Esperanton de H. W. Funk.*

*Arg-424-1387 (2012-12-13 11:33:32)*

*Tiu ĉi poem-traduko estas trovebla en* http://kantaro.ikso.net/das_deutsche_lied_in_esperanto*, pli precize en* http://kantaro.ikso.net/cxe_la_vezero*. Ĝi aperis unue en la kant-libro "Das deutsche Lied in Esperanto", eldonita en 1921 de Friedrich Pillath.*

Denove mi sidas nun tie ĉi,
La kantojn malnovajn mi penas
Reaŭdi, sed vane aŭskultas mi,
La sonĝoj jam ne plu revenas.[6]

La dolĉaj bildoj forestas jam
Sub morna ĉielo premata!
Adiaŭ, adiaŭ, vi sonĝoj de l' am'!
Adiaŭ, vi tempo beata!

*Traduko de la Germana poemo "An der Weser" de* Franz Freiherr von Dingelstedt *(∗1814-06.30 – †1881-05-15) en Esperanton de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 1989-06-20.*

*MR-228-1 / Arg-424-836 (2012-11-01 16:19:41)*

*La teksto troveblas ankaŭ sub* http://www.volksliederarchiv.de/text2521.html*. Vídu ankaŭ:* http://www.axelschaefermdb.de/files/4/1884-das_weserlied.pdf*.*

[6] aŭ: La sonĝoj ne plu revenas.